




En la centro de Ulyanovsk rezidas Ulyanovska regiona scienca Lenin-biblioteko. Ĝi estas konata inter la urbanoj kiel Palaco de Libroj. Sian ekziston ĝi dankas al iniciato de P.M.Jazykov, kiu ĝin fondis en 1848. Leganto de la biblioteko estis juna Volodja Ulyanov. La Palaco de Libroj ricevis la plej belan urban konstruaĵon – domon de estinta Nobela kunveno (arkitekto I.Benjamin). Januare de 1925 ĝi ricevis nomon de V.I.Lenin. Ĉie tie kunvenas urba E-klubo.



Ulyanovska Muzeo-Memorejo de V.I.Lenin estas fondita rezulte de reorganizado de Ulyanovska filio de Centra Lenin-muzeo, kiu estis malfermita en la urbo Ulyanovsk je la severaj tagoj de Granda Patria milito la 2-an de novembro 1941. Post aprilo 1970 tiu muzeo troviĝas en la Memorcentro de V.I.Lenin, konstruita okaze de lia 100-jara jubileo sur la loko de lia naskiĝdomo. Ĝi iĝis la ĉefa konstruaĵo de la urbocentro. La projektantoj sukcesis trovi originalan solvon de tasko: fari multifunkcian domon – muzeon, lernejon, koncertejon. Nun ĝi kunigas la Memoran Lenin-Muzeon, Publikan-politikan centron kaj Grandan koncertan halon. La konstruaĵo havas kvadratan formon kun flankoj po 110 metroj kaj maksimuma alteco 35 metroj. Ĝi baziĝas sur 50 sepmetraj kolonoj. Aŭtora kolektivo de la projekto, gvidata de arkitekto B.S.Mezenцев, ricevis la Lenin-premion en arkitektura branĉo.

Aŭtoro: Margarita Karceva.



LENIN-MEMOREJOJ

URBA
ESPERANTO-KLUBO
100 JAROJ



Pedagogia universitato, kie studas ĉirkaŭ 6000 gejunuloj, portas de 1956 nomon de I.N.Ulyanov. Fremdlingva fakultato kune kun urba Esperanto-klubo ĉiujare organizas Lingvajn Festivalojn (lastan sabaton de marto).



En tiu ĉi domo naskiĝis V.I.Lenin la 22-an de aprilo 1970.



Domo-muzeo de Lenin. Ĉi tie loĝis la familio de 1878 ĝis 1887. La muzeo estas fondita la 10-an de decembro 1923. La gefratoj de Lenin partoprenis tiun aranĝon.



Apude staras nun monumento al lia patrino (1970, skulptistoj P.Bondarenko, O.Komov, Ju.Ĉernov, O.Kirjuhin)

Marija Aleksandrovna estis bone edukita kaj klera virino. Ŝi bone parolis germane, france, angle kaj studis rusan kaj okcidentan literaturon. Profesie ŝi estis instruistino. Tamen ŝi estis multinfanulino kaj devis zorgi pri granda familio.



Lia patro Ilja Nikolajeviĉ inspektis popolajn lernejojn. En 1957, kiam estis la 125-a jubileo de Ilja Nikolajeviĉ, oni inaŭguris monumenton (skulptisto M.G.Manizer), kiu estas proksime de lia tombo. Tio estas busto de I.N.Uljanov. En la piedestalo oni faris elstarajon, tie staras malriĉa kampula knabo en bastoŝuoj kaj kun libro. Tombo de I.N.Uljanov estis en vivmonaĥeja tombejo. Sur la monumento estis malfermita libro.



Gimnazio, kie lernis juna Volodja .

En 1948 ĝi ricevis nomon de Lenin. Multaj ĝiaj lernantoj iĝis famaj: S.A.Buturlin, ornitologo; V.V.Kavrajskij, hidrologo; I.V.Kurĉatov, fizikisto; V.P.Filatov, okulisto kaj multaj aliaj. La konstruado aperis en la jaro 1790 (arkitekto I.Toskani). De 1809 ekzistis porvira gimnazio. En 1990 ĉi tie malfermis siajn pordojn muzeo “Simbirska klasika gimnazio” (en apuda domo, konstruita en 1883).



Tiu monumento al gimnaziano Volodja Uljanov (1954, skulptisto V.E.Cigal) staras sur placo antaŭ malnova stacidomo

La 22-an de aprilo 1940 sur la centra placo oni inaŭguris monumenton al V.I.Lenin. Ĝi estas nun fieraĵo de la urbo. Aŭtoro de la projekto estas arkitekto V.A.Vitman. Sovetia skulptisto M.G.Manizer faris la monumenton dum pli ol 15 jaroj. La tuta monumento havas 14,5 metrojn. Vi povas vidi ĝin sur titola flanko de la faldfolio.